# TEA-BULTENO

**8ᴬ JARO — NOVEMBRO - DECEMBRO 2005 — NUMEROJ 11-12**

## Novembra Programo

| | |
|---|---|
| **01 - mardo** | **Sidejo fermita** |
| 04 - vendredo | 20.00 - Diapozitivoj pri la 90ª UK en Vilno kaj pri Litovio |
| 08 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 11 - vendredo | 20.00 - Ni provu interpretadi! |
| 15 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 18 - vendredo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 20 - dimanĉo | Marcelo Trampuh invitas vin al gustumado de nova vino en Kaštelir! |
| 22 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 25 - vendredo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 29 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |

## Decembra Programo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | 20.00 - "Kiel munti Kripon?" Pri teknikoj, materialoj, scenejoj k.a. parolos la fakulo Giorgio Segovini, membro de la Asocio "Amikoj de Kripoj" |
| 06 - mardo | 20.00 - Laboroj por Krip-ekspozicio |
| 09 - vendredo | 20.00 - "Historiaj originoj de la Kristnaska Kripo" prezentos Giuseppe Castagnaro, prezidanto de la Asocio "Amikoj de Kripoj" |
| 13 - mardo | **11.00 - Inaŭguro de la Ekspozicio pri la konkurso "Mia Kristnaska Kripo"** 20.00 - Kristnaskaj Kripoj en Arto |
| 16 - vendredo | 20.00 - "Antikvaj kaj modernaj Kripoj en la kristana kroata tradicio" - prelego de Marija Belošević |
| 20 - mardo | 20.00 - Filmo pri la 90ª UK en Vilno |
| 23 - vendredo | 20.00 - Festo kun Paĉjo Kristnasko |
| 27 - mardo | 20.00 - Babilado |
| 29 - ĵaŭdo | 20.00 - Ni kune adiaŭu la Jaron 2005ªⁿ! |

### Horaro de la Ekspozicio pri Kristnaskaj Kripoj

La ekspozicio estos malfermita al publiko ekde la 17ª ĝis la 19ª horoj en la jenaj decembraj tagoj:

**13-14-15-16-19-20-21-22-23-27-28-29.**

### *Kara Tea-anaro! Kara Legantaro!*

Rapide alproksimiĝas la fino de la jaro, kaj en ĉi du lastaj monatoj **VIA TEA** havas antaŭ si multegajn realigendajn planojn kaj - ĉefe - plenumendajn laborojn. Ankaŭ en oktobro okazis, ke diversaj programeroj postulis de la prizorgantoj multe da tempo kaj da farado. Eble vi tute ne rimarkis tion, sed mi povas vin certigi, ke fakte tiel estis! Do, oni multon klopodis, kaj daŭre klopodadas, por vigligo de kluba vivo kaj diskonigo de Esperanto, sed tio, al kio ni celas, bedaŭrinde preskaŭ neniam realiĝas. - *Nu, diru, kion vi fine deziras?*, eble tia estos via demando. Ni deziras nur, ke vi partoprenu, de tempo al tempo, en tio kion ni organizas ĝuste por vi. Ĉu ni estas tro postulemaj? Ni esperas, ke ne, tial ree mi kuraĝas atentigi vin pri la venontmonataj programoj, inter kiuj certe almenaŭ iu ero allogos vin.

Daŭre vi trovos vesperon dediĉitan al plibonigado de lingva kono kaj perfektigado de viaj scioj pri esperanta gramatiko, de-temp-al-tempos leciono pri interpretado, foj-foje projekciado de diapozitivoj aŭ filmoj pri Esperanto-eventoj, dum en la tuta decembra monato ĉio rilatos al Kristnaskaj Kripoj kaj periodo. Ĉe via Asocio okazos prelegoj pri Kripoj, faritaj de triestaj kaj eksterlandaj kompetentuloj, okazos ekspozicio pri Kripoj, inter kiuj elstaros tiu centjara el Bohemio, kaj ekspozicio pri tiutemaj infan-ellaboraĵoj (en la pasinta TEA-Bulteno estis publikigita la koncerna konkurso, kiun certe vi diskonigis inter viaj konatuloj!). Inaŭgura ceremonio de ambaŭ ekspozicioj okazos **mardon la 13ªⁿ de decembro, je la 11ª horo**: ni certe havos la plezuron, vidi vin inter la publiko, ĉu ne? Ĉi tiuj agadoj estas kvazaŭ antaŭpreparoj al grava evento kiu tuŝas nin ĉiujn: en januaro ni eniras la jaron de centjariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, dum kiu okazos, en ties tuta daŭro, pluraj kaj pluraj aranĝoj, por celebri inde kaj brile tiun gravan daton. Kaj certe **VI** estos niaflanke por kunhelpi kaj kunlabori, ĉu ne? Por realigi kaj elstare pretigi kion ni programis, estas bezonata ankaŭ vi, kiu, ĉu per konkreta ago ĉu per ideoj kaj sugestoj, povas sukcesigi kion ni iniciatis.

Kaj fine ni atendas vin por kune festi (do, ne nur por labori!) kaj Kristnaskon kaj la Jarŝanĝon! Nepras via ĉeesto en ĉiu kazo, ĉar sen VI eĉ nia laborado iĝas nula! Dankon pro via atento kaj... ĝis baldaŭ!

*Via TEA-Bulteno-prizorganto Elda*

**Atentu! Atentu!** Ankaŭ ĉijare Paĉjo Kristnasko vizitos nin: ne plorigu Lin per via neĉeesto, ĉar li kunportos, kiel tradicie, sian pezan sakon, riĉan je donacoj por vi ĉiuj!

# 91ª Universala Kongreso
# Florenco 2006 – 29.07-05.08

**Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo**

## *Jam temp' està* aliĝi al NIA UK!

Dum la Vilnius-Kongreso la italaj LKK-anoj prezentis skize kaj koncize la preparlaborojn por la venontjara Florenca-UK. Por varbado tutsemajna ĉe kongreseja giĉeto volontulis aro da aktivemuloj, kiuj malavare disdonadis afiŝojn kaj poŝkalendaretojn prikongresajn. La intereso de la publiko estis mezurita per la rapida elĉerpiĝo de la ĉiutage disponigita stoko da aliĝiloj kaj UNUA BULTENO.

Nun alvenis la momento, por ke ankaŭ **VI**, kara itala amiko, mem aliĝu kaj invite aliĝigu kaj amikojn kaj kon-atulojn. Kaj fine ne forgesu, ke ĝis la jarfino, oni ĝuas malplikostajn aliĝ-kotizojn! Nu, *jam temp' està!*

Jen la kongreskotizoj validaj ĝis la 31ª de dec. 2005.

1) Individua membro de UEA 160 €
2) ne individua membro de UEA 200 €
3) komitatano/kunulo/junulo/handikapulo mem individua membro de UEA 80 €
4) komitatano/kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro de UEA 120 €

Por pliaj informoj, jen retadresoj:
fei@esperanto.it uk2006.informoj@esperanto.it kaj...
bv. viziti la ttt-ejon www.ukflorenco2006.it

*Dum ni prepariĝas por tiu evento, tiel grava por la tuta itala esperantistaro, ni aŭskultu la rememorojn pri la 40ª UK okazinta en 1955 en Bolonjo, tiel bele kaj emociriĉe rakontitajn de Luigi TADOLINI, la tiama LKK-Sekretario.*

☆ ☆ ☆☆☆ ☆ ☆

Sono trascorsi 50 anni da quel 1955, durante il quale fu celebrato, qui a Bologna, il quarantesimo *UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO*.

Fu un avvenimento di tale risonanza da meritare una definizione "aurea": fu chiamato, infatti, "LA ORA JUBILEO", il Giubileo d'Oro. Definizione appropriata, non solo per l'indubbio successo, abbonantemente evidenziato anche dalla stampa locale dell'epoca, ma soprattutto perché si compiva in quell'anno il 50° anniversario del primo Universala Kongreso de Esperanto, tenutosi nel 1905 a Boulogne-sur-Mer. Dunque, se nel 1955 si compivano i primi cinquant'anni di quel primo Congresso, che aveva dato inizio e slancio alla storia dell'Esperanto, questo 2005 segna l'anno del 1° Centenario.

Ma torniamo a quel 40° Universala Kongreso del 1955. Ai giovani, non ancora nati in quell'anno, sembrerà sentir parlare di preistoria. Si fa presto a dire "Congresso Universale di Esperanto". Ma pochi conoscono lo sforzo, la fatica, le notti insonni, le angustie, le preoccupazioni, lo sforzo per combattere le difficoltà, superare gli ostacoli, vincere le incomprensioni di ogni genere, la lotta quotidiana sostenuta da pochi, pochissimi "incoscienti" del LKK, per costruire ora per ora tutta l'impalcatura di un congresso, per farcela insomma.

E fu il 40° UK, a cinquant'anni dal 1° di Boulogne-sur-Mer: "*LA ORA JUBILEO*"!

Sentivamo tutti fortemente il significato di questo avvenimento e sentivamo soprattutto la responsabilità di essere i primi a preparare la massima assise degli esperantisti di tutto il mondo, subito dopo la famosa "Risoluzione di Montevideo". Ricordo bene queste parole di Hans Jakob: "Bulonjo 1905 kaj Bolonjo 1955; nur literŝanĝo, tamen kiom signifa por ni!"

Il 1905 era stato il punto di partenza dell'azione di pochi idealisti, fermamente convinti della bontà dell'idea. Il 1955, con il prestigioso riconoscimento da parte dell'UNESCO e con la storica "Risoluzione di Montevi-deo", aveva segnato sì un emozionante traguardo, ma non una sosta. Anzi, da lì bisognava ripartire con nuovo slancio e con rinnovato entusiasmo.

Così il Congresso di Bologna era sostenuto, ma anche condizionato da questi due potenti fattori: il Giubileo e la Risoluzione di Montevideo, quella che tutti noi, con molto ottimismo, consideravamo ormai "la oficiala venko". Tradizione e progresso: queste furono le caratteristiche, le direttrici sulle quali ci muovevamo e che animavano il Congresso. Questa doppia matrice era messa chiaramente in luce nei diversi momenti del nutrito programma. Vennero i pionieri del 1° Congresso di Boulogne-sur-Mer: Raffaele Bagnulo, Paul Nylén, Edmond Privat, Donald Searle e, con loro, molti veterani dei tempi eroici, esperantisti del 1905 come Hans Jakob, del 1908 come Fernandez Menéndez, del 1910 come Teo Jung.

I due sindaci di Bologna e di Boulogne, presenti attivamente nelle fasi più salienti dei lavori, rappresentavano per noi il simbolo tangibile del traguardo raggiunto.

Quando Giuseppe Dozza, Sindaco di Bologna, con accanto il collega francese M-eur Héguenette, fra i vessilli delle due città gemelle tenuti alti da funzionari in uniforme di gala, inaugurò solennemente il 40° e, parlando in perfetto esperanto, dichiarò di poter garantire: "Nome de ĉiuj urbanoj, ke Bologna, nature gastama urbo, estas fiera akcepti la tutmondajn batalantojn por la paco", sembrò che il Teatro Comunale crollasse per l'enorme, irrefrenabile applauso che accolse le sue parole. Fu invece una ventata di commozione profonda quella suscitata dalle parole di Ernfrid Malmgreen, l'allora Presidente dell'UEA, mentre si accingeva a salutare il Congresso con il discorso di apertura. Erano le stesse parole che 50 anni prima erano echeggiate a Boulogne-sur-Mer dalle labbra del dott. Zamenhof in persona: "Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj, mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj, el la granda tutmonda familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn en la nomo de la granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas".

Ricordo che, nell'attento silenzio dell'assemblea, su molti occhi luccicavano le lacrime.

Nel ricordo, desidero onorare la memoria di quegli amici, membri o collaboratori del Comitato Organizzatore di Bologna, che in quei giorni profusero ogni loro energia dando tutto di se stessi all'esperanto, in forza fisica, intelligenza, lavoro indefesso, e che ora non sono

più tra noi: l'avvocato Raffaele Bagnulo, il cav. Giuseppe Zacconi, allora Presidente del LKK, e sua figlia profssa Norma, i coniugi Gamebrini, l'ing. Otello Nanni, il M-o Arnaldo Curti e, in modo particolare per la grande amicizia che mi legava a Lui, il prof. Carlo Agostini.

Vorremmo essere rimasti fedeli al loro insegnamento e alla loro speranza:

Nur rekte, kuraĝe
kaj ne flankiĝante,
Ni iru la vojon celitan!

# 100-jariĝoj


Pluraj celebradoj pri 100 jaroj de esperanto-grupa aktivado jam okazis, nuntempe okazadas kaj plu okazos tra la tuta mondo. Ankaŭ triestanoj estas vigle laborantaj por digne festi tiun eventon en venonta jaro, dum en Roma baldaŭ komenciĝos kvar-taga maratono de brilaj aranĝoj pri-100-jariĝaj.

Gratulojn al la Esperanto-Grupo "LUIGI KAJ CAROLINA MINNAJA" en Roma kaj sukcesoplenan festadon!

De la 8ª ĝis la 11ª de decembro 2005 jubilee celebros la esperantistaro en Romo. Oficiala ceremonio, ĉeeste de esperantistaj kaj neesperantistaj gravuloj, okazos en Salono *Protomoteca* de *Campidoglio*. Memore al la pioniroj oni floromaĝos ilin, kune kun ties familianoj, en la Tombejo de *Verano*. La programo antaŭvidas Lingvan Seminarion, muzikvesperon kaj kompreneble turisman ĉiĉeronadon tra la Italia ĉefurbo.

Aliĝkotizo egalas al 10 eŭroj. Tranoktado plus plena pensiono kontraŭ 60 eŭroj tage eblos en dulitaj ĉambroj apud *Vaticano*.

Por antaŭmendoj kaj kromaj informoj turniĝu al:
Michela Lipari - Tel. 06 39726198
michela.lipari@tiscali.it



## Malferma Tago en la Centra Oficejo

### Sabaton, la 26an de novembro

Antaŭ 50 jaroj, en novembro 1955, la Centra Oficejo de UEA translokiĝis el la apud-Londona vilaĝo *Heronsgate* al la havenmetropolo Roterdamo. Tiun datrevenon atentos la venonta MALFERMA TAGO, sabaton, la 26an de novembro. Historiisto Ziko Sikosek prilumos tiam en sia prelego la historion de la ĉefaj sidejoj de la monda organizaĵo ekde Ĝenevo ĝis Roterdamo. Li ankaŭ intervjuos iamajn oficistojn, interalie John Rapley, kiu estis la lasta direktoro en la oficejo en *Heronsgate*, kaj Victor Sadler, kiu dum du jardekoj laboris en la Roterdama oficejo.

Apud historiaj trarigardoj oni ankaŭ ne forgesos la aktualajn taskojn kaj defiojn de la Asocio, pri kiuj parolos prezidanto Renato Corsetti. Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon.

La Malferma Tago daŭros de la 10ª ĝis la 17ª horo.

# Triesto kaŝita

### Malkovru nekonatajn erojn de nia urbo!

## LA ORGENO DE KUGY

Sur la monteto de Sankta Vito, en strato *Giustinelli*, staras preĝejo dediĉita al la "Beata Virgulino de la Gracoj", posedaĵo de "Kongregacio de Pastroj Meĥitaristoj / Mekitaristoj", kiu hodiaŭ gastigas la Germanlingvan Komunumon. Jes ja, ĝuste tiu preĝejo en kiu ni plurfoje ĉeestis la mesojn de pastro *Ammer*.

La Pastroj Meĥitaristoj, katolikaj laŭ armena rito, alvenis Trieston el la insulo de Sankta Lazaro, nomita "Insulo de Armenoj" en la Venecia laguno, kie ili establiĝis el Konstantinopolo.

En tiu preĝejo staras altvalora raraĵo: ege bela orgeno (dekses-registra artaĵo de la fama *Rieger*) kiun je la fino de la 19ª jc malavare donacis la alpisto-verkisto-botanikisto-muzikisto Julius Kugy.

En 1894 li redaktis kuriozan interkonsenton kun la Pastroj rilate al lokigo kaj uzado de la multvalora orgeno. Tiu kontrakto – nuntempe konservita ĉe Teatra Muzeo *Carlo Schmidt* – antaŭvidis, sekve de la orgendonaco al la preĝejo, ian specon de uzadkoncesio, t.e. konsenton al la donacinto ĝin ludi de la 10ª h matene ĝis la 22ª vespere, kvankam kun precizaj limigoj, interalie ekskludo de publikaj prezentadoj. Aliflanke, Kugy sin devigis ludi la orgenon dum dimanĉaj diservoj kaj okaze de geedziĝoj.

Sed malgraŭ bonintencoj, ne ĉio glitis ĝustaflanken.

Netolerema kaj incitiĝema ŝipkuracisto, proksime loĝanta, plenis je malamo kontraŭ Kugy kaj precipe ties orgeno. El sia vidpunkto li eĉ pravis, ĉar hor-horojn daŭris liaj preskaŭ ĉiutagaj koncertoj: do, komenciĝis tute aŭtentika "muzika milito". Dum tiuj orgenmatĉoj, la kuracisto sovaĝe fuŝludadis per harmoniumo, kiun li ĝuste por tiu uzado intence estis aĉetinta. Kelkfoje li varbis knabaĉaron por misagorde korusi sub la fenestroj de la preĝejo, kaj detempaltempe eĉ veraj soldatstilaj muzikbandoj kun kvantego da tamburoj kaj tamburegoj.

Sed la obstina alpisto ne cedis kaj la kuracisto, venkita, finfine translokiĝis.

*3ESTULO*

# Kvizo



**La kameloj de arabo**

Iu arabo, antaŭ ol morti, testamentis al siaj tri filoj 17 kamelojn, kondiĉe ke la plej aĝa el la filoj ricevu la duonon de ili, la mezaĝa la trionon kaj la plej juna - la naŭonon.

**Kiom da kameloj ĉiu el ili ricevis?**

Kiel kutime, Triesta Esperanto-Asocio premios la korektе kviz-solvontojn. Se intertempe cerbumado vin tro lacigas, iomete vi distriĝu per saniga ridado! Legu ĉi sube!

*Turisto, promenanta apud hotelo, demandas belan knabinon:*

*- Ĉu vi parolas angle?*
*- Nur iomete.*
*- Ĝuste kiom?*
*- Ducent dolarojn!*

---

**Proverbo**: Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno

**Mallonge pri...** *Mesaĝo de Havra Esperantista Grupo - Francio*

La gvidilo TURISMO KAJ ESPERANTO estas preta ĉe www.gvidilo.org Vizitu ĝin kaj aldonu viajn proprajn informojn. Diskonigu maksimume tiun ĉi mesaĝon!

*Informis martouf@tele2.fr*

***Mongola-ĉina intersuperlerneja konsento ankaŭ en Esperanto*** Sekve de intensa klopodado, rektoroj de Mongola instituto pri sociaj sciencoj kaj Ĉina Instituto pri eksteraj aferoj kaj ekonomio konatiĝis, pridiskutis kaj fine subskribis kontrakton pri ĝemeliĝo, en 3 lingvoj: mongola, ĉina kaj Esperanto.

*Raportis Ch.Enkhee<enchjo@yahoo.com>*

***Esperanto Muzeo de Vieno nun tute novsidejas.*** Jen la adreso: Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-muzeo - Palais Mollard - Herrengasse 9 - 1010 Vieno Aŭstrio.
La deĵorhoroj, ekde novembro, estas la sekvaj: Esperantomuzeo: lun-merkr-vendr-sab: $10^a$-$14^a$ h; ĵaŭde $15^a$-$19^a$ h. Kolekto por Planlingvoj: lun-merkr-vendr: $9^a$-$16^a$ h; ĵaŭde $12^a$-$19^a$ h. *Informis Herbert Mayer, direktoro de IEMW*

***345 koreaj studentoj lernas Esperanton.*** En Koreio Esperanto estas instruata en tri universitatoj, nome Univ. Korea fremdlingva, Dankook kaj Wonkwang. Por la dua semestro 2005, sume 345 gestudentoj aliĝis al la kursoj. En la unua leciono la studentoj povis aŭskulti klare dialogon inter esperantistoj per Skajpo, senpaga internacia reta telefonsistemo, kun surprizo kaj intereso. La kursoj daŭros dum 15 semajnoj po 2 horoj semajne. Gratulmesaĝoj estas bonvenaj ĉe www.esperanto.co.kr aŭ esperant@unitel.co.kr (LEE Jung-kee)

***Zamenhof-statuo staras en Zaozhuang*** Aŭguste ĉijara, okazis inaŭgura ceremonio en la kultura placo de Zaozhuang-urbo: statuo de Zamenhof estis tie starigita, ĉeeste de s-ro Yu Tao, estrarano de UEA kaj ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo.

*Raportis: semio <espero@zz-public.sd.cninfo.net>*

***Esperanto-kurso en Ĉina Universitato*** En la Fakultato pri Internacia Turismo de Ĉina Universitato pri Aministrado kaj Softvaro, en Pekino, ĝi komenciĝis duone de septembro: s-ro Cui Jiayou gvidas la kurson kun pli ol cent studentoj. S-ino Lordanka el Anglujo kaj s-ro Elvis el Niĝerio kaj du ĉinaj samideanoj vizitis la kurson kaj faris paroladon pri lernado kaj aplikado de Esperanto. Vizitu: http://sukceso.go1.wy8.net/kurso.htm

*Raportis: Cui Jiayou <amikeco@sina.com>*

***Du studentoj al Azio laŭ la Silk-Vojo*** Laŭplane foriris Alexis Le Rossignol kaj Rémi Frémont, francaj studentoj, cele al malkovro de la Eŭropaj kaj Orientaj bazaroj, tra la landoj de la Silk-Vojo kaj i.a. tra pluraj malbone konataj landoj (Uzbekio, Kirgizio k.a.): entute 15 000 km, piede kaj/aŭ helpe de publikaj transportoj. Ili alcele eklernis Esperanton por havi senperajn kontaktojn kun la loĝantoj. Dum sia 11-monata vojaĝo, ili rakontos sian aventuron en ttt-ejo://capasia.over-blog.com/. Subtenu ilin en la trairotaj landoj: assocapasia@yahoo.fr Legu pli ĉe http://esperanto.angers.free.fr/spip/breve.php3?id_breve=24 *Raportis: LoVi <laurent.vignaud@numericable.fr>*

**LA GAZETO**

En ĝi diversnaciaj aŭtoroj skribas, klare kaj klere, pri ĉiaj temoj por internacia legantaro! Eblas kiam ajn komenci abonon! Petu pliajn informojn kaj malnovajn ekzemplerojn al la peranto por Italio:
Elda Doerfler, testudo@adriacom, poŝtkonta numero 17452996




## ORANĜOKUKO

Tre bongusta kuko, ŝvelmola kaj delikata, kiu perfekte povas finkroni eĉ Kristnaskan manĝon.

*el «La cucina del Friuli-Venezia Giulia»**
*de A. Molinari Pradelli*

**INGREDIENCOJ**



| | |
|---|---|
| 125 g | da amandoj |
| 120 g | da sukero |
| 60 g | da faruno |
| 5 | oranĝoj |
| 5 | ovoj |



butero (por ŝmiri tortujon)
faruno (por surŝuti rosto-paton)
fajne muelita sukero (por surŝuti la kukon)

**PREPARADO**

Forraspu la ŝelon de 3 oranĝoj kaj dispremu ilin. Muelu la amandojn. Apartigu la ovoblankojn kaj pufigu ilin per batmiksilo. En kuvon enmetu amandojn, raspitan oranĝoŝelon, oranĝosukon, ovoflavojn, sukeron kaj farunon kaj ĉion bone kirlu.
Aldonu la pufigitajn ovoblankojn kaj delikate miksu la tuton ĝis formiĝo de mol-densa pasto. Verŝu ĝin en la jam buterumitan kaj farunumitan bakujon.
Kuiru en forno (je 180°) dum cirkaŭ 35 minutoj. Perfektan kuiradon oni akiras, kiam enŝovitan dentpikilon oni eltiras pura kaj seka. La elujitan torton aranĝu sur pladon, ĝin dekoraciu per onoj de la 2 restantaj oranĝoj kaj surŝutu per fajne muelita sukero. La oranĝo-onoj devus solvi la sukeron tiel elstariĝante kiel sur neĝo-tapiŝo.

* *Kuirarto en Friulo-Julvenetio*

**Korespondi deziras**: **Gejunuloj el Brazilo**—En Rio-de-Janejro estas kvin junuloj dezirantaj interŝanĝi leterojn en Esperanto, per ordinara poŝto. Se vi taksas ĉi proponon interesa, skribu al ilia instruisto, kiu responde sendos informojn pri ili, inkluzive fotojn. Skribis samideano Celso Pinheiro >cppaco@uol.com.br<

**Pola sinjorino**—Deziras korespondi kun italino ĉirkaŭ 40-60-aĝa, prefere el la norda parto de Italio. Elż'bieta Sadura—str. 11 Listopada 12 - PL28-400 PINCZOW Polonia

**Junulinoj el Indio**—Tri barataj lernantinoj de Esperanto en Bangaloro volas korespondi (nur papere) kun pli-malpli samaĝaj esperantistoj (13 j.). Sendu viajn proponojn kun adresoj al Venkatesh Reddy <esperovr@yahoo.co.in> aŭ al Gabriele Corsetti <gabriele_corsetti@hotmail.com>

**Al vi ĉiuj korajn bondezirojn**
**de Serenaj Festotagoj!**
**Ni revidos nin mardon la 10$^{an}$ de januaro 2006!**

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349